



# LA JUNA VIVO

MONATA GAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO“

Redakcio: S-ino E. Burgler, Geleen, Markt 58, Nederlando

Administracio: S-ro G. de Vries, R.P.I. Fav. AB, Bosdijk 771, Eindhoven, Nederlando

Giro Nro 537168

Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro

## LA JUNA VIVO PLIAMPLEKSIĜIS.

Kvankam en Ry sufiĉe diskutiĝis pri eventuala aperigado de L.J.V. laŭ t.n. ofsetpresoj, la taga estraro, pristudinte ofertojn, specimenajn gazetojn kaj la bremsan buĝeton juĝis, ke estas pli bone daŭrigi en la ĝis nun sekvita maniero, tamen kun la diferenco, ke la nombro da paĝoj pligrandiĝu.

Kaj jen, karaj gelegantoj, antaŭ vi kuŝas via gazeto en nova kostumo kun ŝeŝa kapo, anĝleksante, ĉu bone 12 paĝojn!! Dek du paĝojn, kiuj ek de nun estas plenigataj laŭ tute niaespere pli agrabla aranĝo. Trafoliumante vi konstatos, ke aldoniĝis kelkaj novaj rubrikoj kaj ke krome ankaŭ la gazeto de la aspirantaj anoj LA BURGONO, kiu ĝis nun estis multobligata kaj nur dumonate aperis, trovis lokon. En la venonta numero ni prove volas apliki 2 kolonojn por la paĝoj kun malgrandaj literoj. Pro la enmetitaj regularoj ŝajnis al ni pli bone ĉiĉoj ne jam fari tion.

Por plenumi la deziron de (kritikemaj) membroj, kies argumentoj ne ĉiam estas sur neŭtrala tereno, ni enmetas la rubrikon „ĈU NE?“, pri kies enhavo respondecas nek la redakcio nek la estraro. La intenco estas ke la anaro esprimu en ĝi sian opinion (pri kio ajn), kritikon aŭ proponojn.

Eble vi demandas vin, ĉu ĉi tiu nova aranĝo ne rezultigas plialtigon de la kotizoj. Tamen nur por la aspirantaj anoj ni estis devigataj postuli pli altan kotizon, pro la fakto ke ili de nun ĉiumonate ricevos L.J.V.-on kun siaj propraj paĝoj.

Amikoj, venis nun denove la tempo por propagandi viajn organizon kaj gazeton. Tiucele: verku, varbu kaj venku!!

T. K.

Unueco estas forto. Ĉu vi estas ano de T.E.J.O.?

## AVENTURETO EN RY.

Mi ŝatas promeni kaj mi ŝatas migri, sed la tagoj en Ry estis iom streĉaj; ŝajnis al mi konsilinde, uzi biciklon por atingi Himmelbjerget, kien ni volis ekskursi. Mi do kolektis ĉujn ankoraŭ al mi konatajn norvegajn vortojn kaj petis unu el la danaj servistinoj, ĉu ŝi ne povus pruntedoni al mi biciklon. Je mia granda surprizo ŝi eĉ komprenis min kaj mi ricevis iun dratazenon, de tiu speco, kiu eligas dum la veturado la plej diversajn tonojn kaj sonojn, pro kio oni ĝin nomas en Germanujo „muelilo”. Kun kelkaj aliaj mi forveturis kaj bone atingis la monteton, kie ni lasis la biciklojn inter arboj. Laŭ kutimo mi ŝlosis la sekurec-seruron kaj nur nun rimarkis, ke ĝi ne havis eltireblan ŝlosilon, sed estis kun ciferoj kaj memkompreneble mi ne sciis la ŝlosilnombron. Kiam mi malkovris ĉion ĉi tion, mia vizaĝo ŝajne montris tiom da mirigita stulteco, ke miaj amikoj ege ridis. („Malica ĝojo estas la plej bona ĝojo!” prave diras germana proverbo). Mi klarigis al ili, ke memevidente la vizaĝo devas ekhavi la esprimon de stulteco, se oni streĉe pripensas ion, kiel mi ĵus faris, ĉar ĉiu ereto de la posedata saĝeco estas bezonata interne kaj sekve malaperas el la mieno! Nome, mi elkalkulis, kiom da kombinoj de cifergupoj ekzistis: estis 243! Provi ĉujn ne eblis pro la fakto, ke mia vizo nur du tagojn ankoraŭ validis. Fine mi, fidante al miaj norvegaj lingvosciroj, iris al proksima hotelo, por telefoni.

15 minutojn mi bezonis, por klarigi unue al kelnerino, due al kelnero, trie al la vokita hotelestro mem, kion mi deziris. Tiam ili per aparato (kiu aspektis kiel la aŭdilo de mia surda avino kaj kiu certe estis inventita antaŭ la eltrovo de la telefono) provis atingi la „Højskole”. Nun estis mia vico. Iu servistino demandis ion kaj mi kriis en la aparaton, kion mi volis. Ŝajne mi timigis la knabinon, ĉar ŝi ne plaperis. Mi senpacience atendis, ĝis iu alia voĉo estis aŭdebla. Mi kriis, flustris, flutis, kantis, modulis mian voĉon laŭeble kaj fine komprenigis min kaj, ho miraklo!, komprenis la ŝlosilnombron! Kia sukceso ..... Plena de triumfo mi reiris al la biciklo, kie mi povis malŝlosi la seruron.

Sed mi petas vin, organizontoj de la venonta kongreso, zorgu, ke la salajrujoj de nia estonta kongresloĝejo scipovas Esperanton, por ŝpari al nia tian laboregon per fremda lingvo!

G. Fam.

## KONKURSO PRI FOTOJ KAJ VERKAJOJ.

En la marta nro ni anoncis la aranĝon de 2 konkursoj. La unua rilatas al la fotoj, faritaj dum la I.J.K. en Ry. Kompetenta komisiono, konsistanta el s-roj Böttcher, ĉefestrarano de la nederlanda Esp. asocio L.E.E.N.; Hendriks, del. de U.E.A. kaj Slauerhoff, prof. fototeknikisto prijuĝos ilin.

La dua konkurso koncernas verkaĵojn, kiujn vi faru pri Ry, pri Danio, la dana kulturo, aŭ similaj temoj danaj. Ĉikaze la juĝonta komisiono, atentanta la stilon kaj enhavon, konsistos el s-roj Böttcher, Hendriks kaj Kat.

La verkaĵoj enhavu maks. 1000 vortojn.

Aldonu al viaj fotoj kaj/aŭ verkaĵoj vian plenan adreson. Sciigu ankaŭ vian aĝon, ĉar tio kompreneble ludas rolon. La plej bela foto aperos en nia gazeto, same kiel la plej bona verkaĵo.

Sendu verkaĵojn kaj fotojn antaŭ la 1a de decembro al la sekr. La premioj konsistas el libroj.

(daŭrigo).

9. **Elekto de la kaskontrola komitato.** En ĝi estas elektataj Henk Westra kaj Henk Brinkman, Leeuwarden (Ned.).

10. **La aspirantaj anoj.** Por ili eldoniĝis multobligita organo „La Burgono”, kiu ne plene kontentigis, precipe pro ĝiaj malofta apero kaj nebela aspekto. Tammo Kanter proponas estonte multobligi L.J.V., tiel ŝparante monon por plibonigi la Burgonon. Maglajlic Atif kaj Helmi Veldhuyzen protestas. Laŭ ili L.J.V. estas la plej grava organo de T.J.O., kiun legas la plimulto el la anaro, nome la pli aĝa junularo. Geert de Vries kaj Tammo Kanter proponas kompromison. Aperu unu 12-p. organo, en kiu du paĝoj formos L. B. La tuto estos presata laŭ „offset”-metodo, per kiu grava sumo estos ŝparata. Ankaŭ eblos enpresigi fotojn kaj desegnaĵojn. Post rigardo de „offset”-presa provo, la propono estas akceptata. Oni fiksas la abonprezon por aspirantaj anoj du guldenoj jare, por ĉiuj aliaj tri guldenoj.

11. **I.J.K. 1953-a.** Neniu invito estas ricevita, krom unu provizora de la Itala Esperantista Junularo. Ĝi tamen ne plu korespondis pri tio. Oni timas ĝenerale, ke kongreso en Italujo estos tro multekosta. Helmi Veldhuyzen proponas informiĝi, ĉu la antaŭ du jaroj ricevita invito de la urbestro de Kufstein (Aŭstrujo) ankoraŭ validas. Aŭstrujo havas plurajn avantaĝojn, i.a. pro sia favora kurzo kaj pro tio, ke la Universala Kongreso okazos en najbara lando. La propono estas akceptata.

12. **La Juna Vivo, aspekto kaj enhavo.** Pri ĝi jam estas parolita sub n-ro 10. — La prezidanto sciigas, ke f-ino Kool deziras ekŝigi kiel redaktorino kaj administrantino. La estraro kandidatiĝas s-inon E. Burgler por la funkcio de redaktorino. Ŝi estas elektata unuvoĉe por la daŭro de unu jaro. — Tammo Kanter esprimas nun varman dankon al f-ino Kool (neĉeestanta), kiu dum 18 jaroj laboris, unue por LJV kaj post la fondiĝo de TJO ankaŭ por la organizo.

13. **Propagando.** La prezidanto akcentas ke unuafoje en la buĝeto oni dediĉas sumon al la propagando. Propagando por T.E.J.O. estas necesega, unuafoje inter la jam ekzistantaj junaj esperantistoj. Oni decidis eldoni malgrandan broŝuron kun informoj pri T.E.J.O.; unue en Esp., se eble en kunlaboro kun la ĉefesperantoj ankaŭ en naciaj lingvoj. La E-lingvan broŝuron oni povas disdoni en la U.K. kaj en naciaj E.-kongresoj. — Daniel Luez proponas, ke oni sendu pli regule artikoletojn al la naciaj E.-revuoj, kiuj verŝajne volonte enpresigos ilin. Helmi V. esprimas sian dubon pri tio lasta, sed opinias ke oni ĉiukaze faru la provon. Akceptata.

14. **Kunlaboro kun aliaj junularmovadoj.** La prezidanto parolas pri la nova interkonsento pri kunlaboro inter la ned. E.-unuigo L.E.E.N. kaj T.E.J.O. Helmi Veldhuyzen parolas pri la verŝajne fondota internacia unuigo de esp. studentoj kaj altlernejoj kaj proponas ke T.E.J.O. interkontaktu kun ĝi por eventuala kunlaboro.

15. Ne estas envenintaj proponoj.

16. **Diversaĵoj.** Maglajlic Atif proponas novan manieron por voĉdono, tiel ke ne ĉiu persono voĉdonu, sed ĉiu lando havu nombron da voĉoj. Adelheid

Neussner opinias ke ni venas al junular-kunveno ne kiel reprezentantoj de iu lando, sed kiel homoj. Oni decidas konservi la ĝis nun kutiman manieron, nome ke ĉiu aktiva membro havas unu voĉon.

La sola svisa partoprenanto, Bruno Graf, prezidanto de la Junular-Sekcio de S.E.S., kiu ne ĉeestis la oficialan malfermon, transdonas nun la salutojn kaj bondezirojn de la svisaj junaj esperantistoj. La prezidanto dankas lin pro liaj afablaj vortoj kaj fermas la jarkunvenon.

Delft, la 4-an de sept. '52-a.

Helmi Veldhuyzen.

---

## PARENTEZE.

Oni ŝanĝis .....

— Kaj medite mi relegis: „T.J.O. ŝanĝiĝis en T.E.J.O. La decido okazis dum la I.J.K. en Ry.”

..... Dum tiu nokto mi sonĝis.

En la malproksimo venas incitege malrapide en mian direkton funebra procesio. Sentema, kiel mi estas je ĉi tiaj tragikaj okazajoj en la vivo, mi haltas kaj rigardas respektplene. Kiam la procesio estas pli apuda, mi rimarkas, ke ĝi konsistas — ho strange — nur el pluraj grandaj, nigraj ĉerkoj. Kaj antaŭ mi ĝi haltas. Brueto eĉ ne aŭdiĝas, ĝis mi konstatas paliĝinta, ke la kovriloj de ĉiuj ĉerkoj malfermiĝas. Mi volas forkuri, sed miaj kruroj rifuzas. Kun ov-okuloj mi vidas, ke aperas longaj, maldikaj figuroj kaj — subite mi ilin rekonas!

Jen venas:

mia T.J.O.-insigno, iam la gloro de ĉiuj miaj jakoj; kaj vidu tie:

mia T.J.O.-stampilo, iam freŝverda, nun nigra; malantaŭ mia stampilo

grupo da kovertoj kun T.J.O.-surskribo man'-en man' kun grupo da poŝtpapero, ankaŭ kun T.J.O.-surskribo; kaj fine mia T.J.O.-flageto, antaŭe ĉiam kokete flirtanta, nun rigida kaj malgaja.

Ĉiuj senvorte etendas al mi malvarman manon kaj silentaj ree enĉerkiĝas. La kovriloj krakante fermiĝas.

Ploranta mi ankoraŭ diras: „Bonan vojaĝon kaj fartu bone .....”.

La decido okazis dum la I.J.K. en Ry.

Oni ŝanĝis .....

Kato.

---

Neniam ni kredas, ke Esperanto faros el la homoj anĝelojn, ĉar ..... la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj. Sed ni kredas, ke interrilato kaj konatiĝado sur neŭtrala lingva fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de tiuj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de la malbona volo, sed simple de sinnekonado kaj de devigata sinaltрудado.

El „Pensoj de Zamenhof”.

# REGULARO DE T.E.J.O.

## 1. Nomo kaj sidejo:

La nomo de la organizo estas Tutmonda-Esperanto-Junular-Organizo. Ĝia sidejo estas la loĝloko de la prezidanto.

## 2. Celo kaj rimedoj:

a. La agado de T.E.J.O. okazas sur la kampo de internacia junular-laboro. Ĝi celas tie krei solidarecon kaj amikecon kaj pligrandigi la reciprokan estimon por la moroj, pensoj kaj faroj de la junularo de la diversaj landoj por tiel disvastigi la spiritan horizonton de siaj membroj kaj por akceli internacian interkompreniĝon. Ĝi celas enkonduki la internacian lingvon Esperanto en ĉiujn mediojn de la internacia vivo;

b. Ĝi klopodas atingi tiujn celojn per: a) disvastigo de la intern. lingvo Esperanto, b) eldonado de propra organo, c) okazigo de internaciaj renkontiĝoj, ĉ) internacia korespondado, d) kunlaboro kun ĉiuj movadoj, kies celoj estas similaj al tiuj de T.E.J.O., e) propagando en neesperantistaj junular-medioj, f) kontakto kun aliaj esperantistaj-organizoj, g) ĉiuj indaj rimedoj, kiuj pliprosimigas la celojn.

## 3. Karaktero:

T.E.J.O. estas supertendenca rilate al: nacioj, rasoj, religiaj kaj politikaj konceptoj. Ĝi bonvenigas ĉiun kiel membron, senkonsidere ties koncepton pri suprenomitaj aferoj.

## 4. Membreco:

a. Membro povas fariĝi ĉiu junul(in)o, scipovanta aŭ lernanta Esperanton kaj konsentanta pri tiu ĉi regularo. Por konservi la porjunularan karakteron de la organizo, aĝlimo estas fiksita. La T.E.J.O.-anoj estas dividitaj laŭ jenaj kategorioj: a) aspirantaj membroj (ĝis 14 j.) b) aktivaj membroj (ĝis 30 j.), c) kolektivaj membroj (ĝis 30 j.), ĉ) honoraj membroj, d) subtenantoj.

b. Familianoj povas membriĝi je duona kotizo.

c. Ĉiu landa esperantista junular-asocio, kiu konsentas pri par. 2 kaj 3, povas membriĝi sian anaron kolektive. Lokaj kaj regionaj esperantistaj junulargrupoj povas aliĝi kolektive, se tutlanda organizo ne ekzistas aŭ ne aliĝas al T.E.J.O. Tia grupo devas nombri minimume 15 membrojn.

## 5. Eksiĝo:

Oni ekxiĝas: a) propravole, sciigante tion al la estraro, b) per eksigo en kazo de grava kulpo, laŭdecido de la tuta anaro, c) nepago, ĉ) morto.

## 6. Financaj aferoj:

a. La administra jaro daŭras de la 1a de septembro ĝis la 1a de septembro. Oni povas aliĝi je ĉiu ajn dato, pagante kotizon ĝis la 1a de septembro. La membro-kunsido ĉiujare fiksas la kotizon por ĉiu kategorio. Honoraj membroj ne pagas kotizon.

b. La estraro fiksas ĉiujare iun procentaĵon de la kotizoj por laboro en nacia kadro.

c. La membro-kunsido elektas du kasreviziantojn por kontroli la ĝeneralan konton de T.E.J.O. tuj antaŭ la venonta membro-kunsido.

- ĉ. La perantoj sendas konteltiron de la landa kaso al la kasisto ne pli malfrue ol ses semajnojn antaŭ la membro-kunsido.
- d. Neniu funkcio estas salajrata.

## 7. Eldonoj:

- a. La oficiala organo estas „La Juna Vivo”. Ĝi aperas principe 10 fojojn jare. Ĝia enhavo estas konforma al par. 2, kaj pritraktas ĉiajn problemojn rilatantajn al la junularo. Krom tio aperas en ĝi la plej gravaj organizaj informoj. Laŭ la disponebla spaco ankaŭ kunlaborantaj organizoj rajtas enpresigi siajn informojn de ĝenerala intereso.
- b. Por la aspirantaj membroj eldoniĝas infangazeto „La Burgono”. Ĝi enhavas facilajn legaĵojn, kiuj celas samtempe instrui kaj amuzi.
- c. Laŭbezone aperas „La peranto inter la perantoj”, oficiala informilo de la estraro. Ĝi estas senpage ricevebla.
- ĉ. Pri la enhavo de la suprenomitaj eldonaĵoj respondecas la estraro kun la respektivaj redaktoroj. Peranto povas eldoni bultenon, destinitan al la membroj de sia teritorio. Li mem tute respondecas pri la enhavo.

## 8. Organizo:

- a. T.E.J.O. havas jenajn oficojn: estraro, perantoj, konsilantaro kaj komisiitoj por specialaj servoj. Tiuj ĉi funkciuloj estas konsiderataj kiel aktivaj membroj. Ĉiuj estas elektataj de la membro-kunsido. Ĉiu oficas dum unu jaro, post kiu reelektio eblas. Se en la daŭro de la jaro iu posteno ekvakas, la estraro elektas anstataŭanton, kiu oficas ĝis la proksima membro-kunsido.
- b. Peranto ne povas esti membro de la estraro.
- c. Ĉiu aktiva membro rajtas proponi kandidatojn por iu funkcio.
- ĉ. La estraro konsistas el: prezidanto, sekretario, kasisto kaj du aŭ tri asesoroj. La prezidanto direktas la laboron de la estraro. Li prezidas la membro-kunsidon. La sekretario prizorgas la korespondadon kaj la organizan parton en la oficiala organo. Li kompilas la ĝeneralan jarraporton. La kasisto tenas la librojn kaj projektas la buĝeton. Li kompilas la finanĉan jarraporton. La asesoroj dividas inter si la propagandajn kaj vojaĝinterŝanĝajn fakojn. Krom tio ili kunlaboras kun la ceteraj estraranoj por direkti la organizon.
- d. La estraro nomas redaktoron por la oficiala organo. Tiu rajtas ĉeesti la estrarkunsidojn.
- e. Peranto plenumas la organizan taskon en la lando, kie li estas nomita. Li reprezentas la membrojn en sia lando ĉe la estraro (ne la kolektivajn). Lando kun pli ol 20 membroj povas — se tio estas dezirinda — elekti komitaton por dividi la taskojn de la peranto. La peranto prezidas tiun komitaton.
- f. La aliĝintaj landaj asocioj nomas po unu delegito. Tiuj delegitoj formas la konsilantaron, kiu esprimas ĉe la estraro la dezirojn kaj opiniojn de la kolektiva membraro. Per ili la estraro kontaktas kun la aliĝintaj asocioj. Delegito povas samtempe esti la peranto, sed tio ne necesas.
- g. La peranto sendas almenaŭ unu raporton pri sia agado al la sekretario, ne pli malfrue ol ses semajnojn antaŭ la membro-kunsido.
- ĝ. Komisiitoj por specialaj servoj estas elektataj a) de la estraro por laboro en internacia kadro; b) de la peranto kaj la landa komitato por laboro en nacia kadro.

## 9. Renkontiĝoj:

- a. Ĉiujare okazas kongreso, kiu havas klerigan, festan kaj propagandan karakteron. Ĝi okazas, se eble, tuj antaŭ, aŭ tuj post la Universala Kongreso. Ĝin aranĝas la Organiza Komitato, nomita de la estraro. La estraro decidas pri la kongresloko. Detalojn normas la speciala kongresregularo.
- b. La membroj mem povas aranĝi naciajn aŭ limajn renkontiĝojn sub aŭspicioj de T.E.J.O. kun antaŭa aprobo de la estraro.

## 10. Membro-kunsido kaj referendumo:

- a. Dum la kongreso okazas la membro-kunsido por solvi la organizajn problemojn, por elekti funkciulojn kaj por ebligi senperan kontakton inter la membroj kaj la estraro.
- b. Ĉiu membro povas fari proponojn en la intereso de T.E.J.O.
- c. La decidoj de la kunsido plene validas.
- ĉ. Membroj, nepartoprenantaj la kongreson rajtas baloti skribe per la oficiala balotilo, kiu aperas en L.J.V.
- d. Nur aktivaj membroj rajtas voĉdoni. Oni voĉdonas skribe pri personoj, buŝe pri aferoj. Propono estas akceptita, se trikvartonoj de la envenintaj voĉoj ĝin aprobas.
- e. Se tuja decido — antaŭ la membro-kunsido — estas necesa aŭ se membro-kunsido pro iu ajn kaŭzo ne okazas, la estraro okazigas referendumon. Tiukaze propono estas akceptita, se trikvartonoj de la envenintaj voĉoj aprobas ĝin.

11. En kazoj neantaŭviditaj en tiu ĉi regularo decidas la estraro, kun posta aprobo de la membro-kunsido.
12. Tiu ĉi regularo ekvalidas la 1an de septembro 1952a. Ĝi nuligas ĉiujn antaŭ tiu dato validajn regulojn.

## ORGANIZAJ INFORMOJ.

**Asesoroj:** Helmi Veldhuyzen akceptis la propagandan fakon. Sia nova adreso estas: p/a Mrs. Dodd, Tudor House, Withdean Court, Brighton, Anglio. Ankaŭ Michel Duc Goninaz akceptis sian asessoran taskon: informado kaj dokumentado.

En la novembra nro ni detale informos vin pri la novaj fakoj kaj servo.

**Perantoj:** Rolf Brune en Dortmund, fariĝis la nova germana peranto. Ni esperas havi kun li agrablan kunlaboron. Dankon al Günter Milanowski, kiu faris la antaŭlaboron tiucelan.

Nederlandanoj pagu sian kotizon al nia kasisto kaj administranto Geert de Vries.

La kotizo por L.J.V. 12 paĝa, restas 3 ned. guld. (aŭ egalvaloro) por aktivaj kaj subtenantaj anoj. Por aspirantaj anoj ĝi estas 2 ned. guld. (aŭ egalvaloro). Familianoj povas pagi duonan kotizon. Oni povas aliĝi je ĉiu dato. Pagu la kotizon ĉe la aliĝo prefere ĝis la 1a de sept. Kiu do ekz. aliĝas je la 1a de decembro, pagu sian kotizon ĝis la 1a de sept. de la venonta jaro (2.25 ned. guld.). Kiu aliĝas je la 1a de marto, pagu 1.50 guld. ĝis la 1a de sept. Tio plisimpligas nian administradon.

Ĉiu pagu sian kotizon antaŭ la 31a de decembro al sia peranto; post ĉi tiu dato ni devos kalkuli ankaŭ la enkasigkostojn!

La kongresa regularo aperos pro manko de spaco en la nov. nro.

## PERANTOJ KAJ KOTIZOJ DE T.E.J.O.

Aŭstralio:	Fr. Halls, 59 Nepean Highway, Elsternwick S 4. Melbourne	ŝ.	Asp. 5.—	Akt.-Subt. ŝ.	7.—
Aŭstrujo:	Alois Hilkersberger, Landeck, Lötzweg 1. Tirol; poŝtspark. 195356	ŝ.	14.—	ŝ.	20.—
Belgujo:	Ph. Cullus, 13. rue Chopin, Anderlecht—Bruxelles; ĝironro 806765	fr.	27.—	fr.	40.—
Brazilo:		Cr \$	10.—	Cr \$	15.—
Britujo:	F-ino N. Rees, Derwydd, Seven Sisters, Nr. Neath, S. Wales	ŝ.	4.—	ŝ.	6.—
Danujo:	Kaj Pedersen, Brønshøjvej 62, Brønshøj, ĝironro 73478	...	Kr.	Kr.	6.—
Finnujo:	Eld. Vilho Setälä, Onentie 23 Helsinki-kä	.....	Fmk.	Fmk.	265.—
Francujo:	Dan. Luez, Lycée, Laon (Aisne)	.....	Fr.	Fr.	280.—
Germanujo:	Rolf Brune, (21b) Dortmund, Märkischestr. 184	.....	Dm.	Dm.	3.50
Hispanujo:	M. Montserrat, Strato Provenza 75, Barcelona	.....	Pes.	Pes.	30.—
Italujo:	Prof. A. Camuffo, 4. Bart. d'Alviano, Trieste 420	.....	L.	L.	500.—
Jugoslavujo:	Kralj Drago, Rozna Dolina 6-22, Ljubljana	.....	Din.	Din.	40.—
Maroko:	Ben Sion Ohana, Rue de la Kashba I. Marrakech, ĝironro Rabat c/ c. 368.92	.....	Fr.	Fr.	280.—
Nederlando:	G. de Vries, Pav.AB, R.P.I. Bosdijk 771, Eindhoven, ĝironro 537168	.....	f	f	3.—
Norvegujo:	Eldonejo Esperanto A. E. Boks 942. Oslo	.....	Kr.	Kr.	6.—
Polujo:	Benedict Palczinsky, Reda k. Gdynia	.....	Zly	Zly	3.20
Svedujo:	Esperanto-Förlagsföreningen, Box 19071, Stockholm 19	...	Kr.	Kr.	4.10
Svisujo:	Sro R. Keller, Kleinalbis 59, Zürich 45	.....	Fr.	Fr.	3.45
Usono:	E.A.N.A. 114. West 16th. Str. New York 11. N.Y.	.....	\$	\$	1.—

Familianoj povas pagi duonan kotizon.

Uzu vian libro-servon, tiel subtenante la organizon.



# la burgono



MONATA ORGANO  
POR LA ASPIRANTAJ ANOJ



## DEESA KAJ LIA ELEFANTO.

En Hindujo iam vivis koloniisto, kiu deziris eligi pecon da prarbaro por planti kafarbojn. Kiam li estis deseginta ĉiujn arbojn, li forbruligis la arbetojn. Sed nun li ankoraŭ ne povis planti siajn kafarbojn, ĉar la stumpoj de la grandaj arboj ankoraŭ restis en la tero. La plej bona rimedo por forigi la stumpojn estas la reĝo de la bestoj, la elefanto. Ĝi aŭ elpuŝas la stumpojn el la tero per siaj dentegoj, aŭ eltiras ilin per ŝnuregoj.

Tial la koloniisto dungis elefantojn kaj komencis labori. La plej bona besto apartenis al Deesa, kiu estis la plej malbona viro el ĉiuj elefantkondukistoj. La nomo de la bona elefanto estis „Moti Ĝuj”. Tio signifas „perla elefanto”.

Gajninte multe da mono per la forto de sia elefanto, Deesa drinkis kaj ebriiĝis. Tiam li tre batis la beston. Kvankam Moti Ĝuj estis tre forta, li ne mortigis la ebrulon per la piedegoj, ĉar li sciis, ke post la batado Deesa ĉirkaŭbrakumos la rostron, ploros kaj nomos la beston „amo kaj vivo”. Li donos ankaŭ iom da likvoro, kiun Moti Ĝuj tre ŝatis. Tiam Deesa ofte dormis inter la antaŭaj piedegoj de sia elefanto kaj ĉar ĝi ĝenerale elektis la mezon de la ŝoseo por dormi, la trafiko devis halti ĝis kiam plaĉis al Deesa maldormiĝi.

Adolf Burkhardt, laŭ angla rakonto libere verkita.

## AVENTURETO SUR MARO.

Dum mia naŭmonata vojaĝo tra sep eŭropaj landoj mi restadis du monatojn en Danlando. Tri semajnojn mi gastigis ĉe bonkora leteramikino en Aarhus. Per ŝipo mi venis pli poste al Kopenhago trans Kategato. Semajnon pli poste la ŝipo portis min al sudjutlanda vilaĝeto proksime de Fredericia. Kun tri filoj de mia gastiganto mi peto-

lumis tri semajnojn ĉe la bordo de la maro. Ni kvar, en aĝo inter dek ĝis 14 jaroj, banis, kaptis krabojn, kolektis konkojn kaj ludis en la blanka varma marborda sablo.

Do, tiel pasis la tagoj ĝis en unu bela tago s-ro Nielsen invitis nin al ekskurso per motorboato. Li prunteprenis belan ŝipeton kaj frumatene ni ekvojaĝis. Ni estis naŭ personoj. La tre dika s-ino-najbarino kun sia filo Kai ankaŭ kunvenis. Kompreneble la boato estis ŝargita sufiĉe peze. Sed ŝajne ĉio bone funkciis. La motoro turnis konstante kaj senlace la helicon, la ondoj afable klakadis, ni estis bonhumoraj. Jam ni veturis postagmeze longan distancon laŭ la bordo de bela insulo Fynen, jam ni manĝis gaje niajn sandviĉojn — ho ve, subita ekpuŝo haltigis nian veturadon kaj ekcetitaj ni ne sciis kio okazis!

„Subakva roko!”, klarigis s-ro Nielsen la situacion.

Kaj jen, sub la plankobretoj jam aŭdiĝis enpenetranta akvo! Per ĉiaj rimedoj kaj ĉiuj fortoj la viroj provis liberigi nian boaton de sur la roko, dum la knaboj ĉerpis per siteloj la enpenetrantan marakvon. Mi vidis paliĝi kelkajn vizaĝojn pro timo kaj devas konfesi, ke ankaŭ mia koro batis timplene kiam mi rigardis la longan distancon ĝis al la bordo! Naĝi mi ja feliĉe lernis, sed neniam antaŭe mi tranaĝis tiom da distancoj! Apenaŭ ni esperis esti savataj — jen — subite la streĉaj klopodoj sukcesis! Forte vundita nia ŝipeto libere ŝanceliĝis sur la ondaro. Kaj per padeliloj movitaj iom post iom ni alproksimiĝis al la strando. Kiam la profundeĉo de la akvo nur estis ankoraŭ proksimume du metrojn, la junulo, filo de niaj najbaroj, elsaltis el la boato kaj naĝis al la bordo. Tie li kaptis paŝtantan ĉevalon, sursidiĝis kaj rajdis galope al la proksima vilaĝo. Ne longe daŭris kaj el la najbara havenurbo venis rapidŝipo pertelefone vokita. Ŝnurego ĵetiĝis, kiun ni fiksas al nia boato kaj nun ni estis savitaj. La ŝipo trenis nin al haveno kie ni lasis la ŝipon por veturi hejmen per luita aŭtomobilo! Ho, kiel malĝojigitaj ni estis — silentante ni atingis noktmeze nian hejmon — kaj ne paroleme ni tuj enlitiĝis trolacigitaj! Sed en la venonta tago la suno brilis gaje kaj nur nun ni eksentis el kiu granda danĝero ni saviĝis kaj — ĝojis pri la novdonacita vivo!

Sinjo Schmalzriedt.

---

Aĉetu ĉion ĉe via propra Libro-Servo. Pagu vian ŝuldon kiel eble plej baldaŭ.

---



NE RESPONDECAS  
T.E.J.O.

Kvankam mi ne scias precize, kio estas preparolita dum la I.J.K. en Ry (bedaŭrinde mi ne povis ĉeesti), mi ĉi loĝe petas vian atenton por la jeno:

El la statistiko pri la membronombro ni konstatas, ke en pluraj landoj troviĝas nur kelkaj anoj. Laŭsperte mi scias, ke estas terure malfacile entrepreni ion rilate al propagando por unuopulo. Sendube estas urĝe necese, ke ni kunigu niajn fortojn ne nur sur la internacia, sed ankaŭ kaj speciale sur la nacia tereno. Mi scias, ke estas facile skribi ĉi tiujn vortojn, la apliko estas malpli facila. Ne nur por preparoli la varbadon, sed ankaŭ por ne perdi la anojn estas ege necese, ke ili de temp' al tempo kontaktu unu kun la alia: kiam ne eblas persone, tiam skribe. Perantoj, notu bone, ke fari nenion signifas perdon. Se vi ne disponas pri tempo, vi eksigu kiel peranto; eble ja troviĝas personoj, kiuj havas sufiĉe da tempo. Ni uzu la tempon! Kontakti kun via estraro rilate al propagandmanieroj aŭ rilate kion ajn kaj eĉ ne hezitu peti propagandprelegojn. Ni KUNKUNE laboru! La aneco morale devigas tion!

Alia pripensinda afero estas la jena:

Ne malofte okazas, ke vizitinte I.J.K.-on, oni ankoraŭ posedas iom da fremda mono. Se tiu mono estus kolektata fine de la kongrestagoj, ni eble per ĝi povus sendi L.J.V.-on al tiuj gejunuloj, kiuj pro politikaj malfacilaĵoj ne povas aboni ĝin. Jen do maniero por helpi niajn „transferkurtenajn“ amikojn! La ligiloj kun tiuj personoj povas esti profitdonaj ne nur por T.E.J.O. sed ankaŭ por la homaro.

Felix Kat, Nederlando.

#### Noto de la estraro:

En la „Peranto inter la Perantoj“, aperonta en Nov. ni speciale atentigos pri la suprenomita afero rilate al la propagando. La proponita maniero por helpi niajn orientajn geamikojn estos punkto de la venontjara jarkunsida tagordo. Intertempe ni esperas ilin helpi ankoraŭ alimaniere.

### ABDERANA RAKONTETO.

Abderano iam vizitis urbon. Promenante tra la stratoj li ekvidis vendejon, al kiu li proksimiĝis. Amaso da kolbasoj pendis en ĝiaj montraĵ fenestroj. Ĉar la abderano neniam vidis kolbasojn, li eniris la vendejon, por ke li aĉetu por sia tuta mono ĉi tiujn mirigitaĵojn. Li ricevis ilin kaj demandis:

„Kiel oni faras ilin?“

La buĉisto klarigis ĉion detale.

„Mi eble forgesos la recepton“, diris la abderano, „bonvolu skribi ĝin sur paperon.“

Sed en la domo neniu papero estis trovebla.

„Skribu ĉion sur mian ledan pantalonon“, proponis nia amiko.

La buĉisto faris tion kaj la feliĉa posedanto de kolbasoj kaj recepto adiaŭis.

Li iris tra la stratoj. Subite hundaĉo ekvidis la kolbasojn. Ĝi kaŝiris al la senzorga migranto kaj forŝiris ties posedajon.

Terurega la abderano turnis sin. Tiam li ekridetante forviŝis la skribon de sur sia pantalone: „La recepton vi tamen ne ricevos!“

Rudolf Bögel, Schöntal/Jagst. (14a) U.S. Zono, Germanujo.



# esperanton radías..

Listo de radio-dissendoj en aŭ pri  
Esperanto. Tempindiko: M.E.T.

Mallongigoj: I = informoj. P = pa-  
rolad(et)o. K = kurso. M = muziko.

## LUNDE:

19.00—19.30 Rabat (Maroko), 482 m.: K.  
23.15—23.20 Hilversumo II, 298 m., 188 m., V.A.R.A.: I kaj M. (Nur ĉiu-  
dualunde: 13-X-1952 k.t.p.).

## MARDE:

01.45—02.00 Bauru (Brazilo), 91 m., 240 m.: K kaj I.  
08.45—09.00 Rijssel (Lille), 235 m.: K kaj I.  
12.55—13.00 Berno, 31,46 m., 48,66 m.: P de d-ro Arthur Baur.  
16.00—16.15 Vieno, 25 m., 30 m., 41 m., 48 m., 203 m.: P (nur ĉiudumarde!).  
18.35—18.40 Berno, 31,46 m., 48,66 m.: P de d-ro Arthur Baur.  
23.15—23.30 Guatemala, 49 m.: I.

## MERKREDE:

16.45—17.00 Graz (Aŭstrujo), 417,2 m.: K. (Nur ĉiudumerkrede).  
19.00—19.20 Romo, 25,21 m., 31,35 m., 49,92 m.: P kaj M.  
19.30—20.00 Madrido (Radio S.E.U.), 42,33 m., 233 m.: P kaj M.  
22.35—22.40 Vieno I, 25,46 m., 48,74 m., 513 m.: I.

## JAŬDE:

09.30—09.45 Parizo, 348 m., 445 m.: K.  
12.55—13.00 Berno, 31,46 m., 48,66 m.: P de prof. Edmond Privat.  
18.35—18.40 Berno, 31,46 m., 48,66 m.: Ripeto posttagmeza dissendo.  
20.00—20.15 Taragono (Hispanujo), 191 m.: P.

## VENDREDE:

19.00—19.20 Romo, 25,21 m., 31,25 m., 49,92 m.: P kaj M.  
23.15—23.30 Hilversumo I, 402 m., N.C.R.V.: P kaj M. (Nur la unuan ven-  
dredon de ĉiu monato).

## SABATE:

09.30—10.00 Rio de Janeiro, 30,71 m., 375 m.: K kaj I.  
23.15—23.20 Hilversumo I, 402 m. K.R.O.: I.

### Informoj kaj petoj!

**Stacioj fidelaj al Esperanto.** — Ĉi-supra listo montras la staciojn fidelajn al Esperanto. Ili promesis daŭrigi la elsendadon en aŭ pri nia komuna lingvo. Sed necesas, ke la aŭskultantoj regule, almenaŭ de tempo al tempo, sendu skriban aplaŭdon al tiuj stacioj. Alie ili ĉesigos la Esperanto-dissendojn. Jam pluraj stacioj silentas kaj rekomencos siajn Esperanto-elsendojn nur post grandamasa petado de la geaŭskultantoj.

**Informojn pri Esperanto-radio-elsendoj** sendu ne nur la radiostacioj, sed ankaŭ la radio-geaŭskultantoj al: Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, Tjerkerd (Fr.), Nederlando.

---

**Ĉu vi multe korespondas? Uzu leterpaperojn kaj kovertojn de T.E.J.O.**

---